### [Roskilde Festivalo 2013] Unua informletero Roskilde 2013 aperis

*Malsukcesa elŝuto.*

### Verku por Kontakto: Kien la religioj?

Komence de februaro 2013 la Papo Benedikto la 16-a anoncis sian decidon rezigni pri la plej alta ofico en la katolika eklezio la 28-an de februaro 2013. Tiu anonco skuis speciale la katolikan mondon, kies lasta rezigninta papo estis Gregorio la 12-a, en la jaro 1415. Pliaj informoj: http://kontakto.tejo.org

### Barok “Heredo de la Post-Milit´” (akustika versio) ĉe Youtube

Enkonduko de la muziko Heredo de la post-Milit' de la bando Barok. Projekto ludita per kvar instrumentoj: Gitaro, brazila vjolo; kavako kaj baso. antaŭmendu la KD-on ĉe: goo.gl/5pvMO. Rigardu la videon: http://www.youtube.com/watch?v=-Cj2xYZZ6CY

### Varsovia Vento Elsendoj - La 88a elsendo

En la 88a elsendo i.a. Michael Boris kaj Lorenzo pri la IJF kaj Petro pri la ĉi-jara SES. :) Bonan aŭskultadon ĉe http://www.podkasto.net/2013/02/24/la-88a-elsendo/!

### Mojosa renkontiĝo en Valencio, Hispanio, 21a ĝis 23a de junio 2013

Aperis ĵusbakita nova esperanto-grupo en Oliva (sude de Valencio), temas pri junuloj ege entuziasmaj kiuj eĉ decidis aranĝi renkontiĝon. Ili anoncas revolucion en la movado. Estas por mi plezuro, do, diskonigi ilian eventon kiun mi taksas nepre partopreninda.
La renkontiĝo okazos la 21an, 22an kaj 23an de junio, en Oliva, 80 kilometrojn sude de Valencio.
Spektu la videon kiun ili pretigis, kaj trovu ĉiun necesan informon kaj aliĝilon en tiu retejo: http://esperantoval.com/eventoj/ver2013/
Se vi deziras plian informon, bv. kontakti rekte ilin: Oliva Esperanto-Klub' <esperanto_oliva ĉe hotmail.com >

### Ekzotika Renkontiĝo, Berlino, Germanio, 26a de aprilo ĝis 28a aprilo 2013

Venu al Berlino por semajnfino plena je novaj spertoj en amika rondo! Ĉiuj detajloj kaj aliĝilo troveblas ĉe http://is.gd/ekzotika2013 :)

### KOTONA GAZETO informas pri 5-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), 29a de decembro 2013 ĝis 4a de januaro 2014, Kotonuo, Benino

Pliaj informoj pri la kongreso haveblas ĉi tie:
http://uea.org/vikio/Ghenerale_pri_la_AKE_2013 kaj http://uea.org/vikio/Kotona_gazeto

La retejo de Afrika Komisiono http://www.esperanto-afriko.org prezentas nian Kongreson.

## Migrado de Olivier Buisson en la Vogezoj, Francio, 1a ĝis 5a de julio 2013

1a de julio:

Rendevuo ĉe la bus-haltejo de la montpasejo de la Schlucht (col de la Schlucht) kiu situas antaŭ la hotelo "le Tétras" je la 10a matene. La loko atingeblas buse de Munster por tiuj kiuj venas el oriento kaj de Remiremont por tiuj kiuj venas el okcidento. Ambaŭ urbetoj atingeblas trajne.

2a ĝis 4a de julio:

Dumtagaj migradoj kun vespera reveno al la hotelo

5a de julio

Alveno en « Col de la Schlucht » kaj repreno de la valizoj je la 16a posttagmeze. Disiĝo inter la 17a kaj 18a laŭ bus-horaroj okcidenten kaj orienten.

Tranoktejo:

Rifuĝejo de Sotré kies ligilo al retejo jenas: http://www.refugedusotre.com/ La dormejoj estas 5 aŭ 6-litaj ĉambroj kun duŝejo kaj necesejo.

Por pliaj detajloj kaj aliĝilo bv. kontaki Oliver Buisson (obuisson ĉe live.fr)

## 7a TRE-EGE en Gladbeck, Germanio, 4a de majo 2013

TRE-EGE n-ro 7 okazos en urbokvartalo de Gladbeck, kiu estis loĝkvartalo de la ministoj, kiuj iam ĝis la 1960-aj jaroj laboris en la apudaj karbominejoj. El ĉi tiu epoko de relativa bonstato de la laboristoj restas ministaj loĝdomaroj, ŝutmontoj priplantitaj, sur kiuj oni povas promeni.

La renkontiĝo komenciĝos per komuna "pikniko" en la paroĥa domo apud la preĝejo, kie mi ludas orgenon. Tiun ĉi mi prezentos al vi kun ĝiaj teknikaĵoj kaj ludos sur ĝi. La programo estos tutcerte ne plenŝtopita, por ke ni havu sufiĉe da tempo por konversacioj. Vi ricevos ĝin kune kun vojpriskribo unu semajnon antaŭ la 4-a de majo. Pliaj informoj ĉe Ludger Schmeink (ludger-schmeink ĉe t-online.de)

### Venontaj renkontiĝoj

29a Printempa Semajno Internacia (PSI), Sankt Andreasberg, Harz, Germanio, 25a de marto ĝis 1a de aprilo 2013, http://www.esperanto.de/psi

IJF, Ostuni (Brindisi), Italio, 27a de marto ĝis 2a de aprilo, https://www.facebook.com/events/149023481906924/ aŭ http://iej.esperanto.it/ijf/2013/?page_id=15&lang=eo

1a Esperantokongreso en Bogor, Indonezio, 5a ĝis la 8a de Aprilo 2013, https://sites.google.com/site/iek2013bogor/

Esperanto-kastelo Greziljono, staĝo PRINTEMPaS, 20a de aprilo ĝis 1a de majo 2013, http://www.gresillon.org/printempo

Printempa BARO 2013: planita por 8-a ĝis 12-a de majo 2013, http://www.krokodilo.de/baro/baro.php

2a Printempa Esperanto-KunvenO (PEKO 2), La Marlagne, Belgio, 17a ĝis 19a de majo 2013, https://www.facebook.com/events/428080153920714/

14a KEKSO en Nürnberg, Germanio, 17a ĝis 20a de majo 2013, https://esperanto.de/kekso

90a Germana Esperanto-Kongreso (GEK), Nürnberg, Germanio, 17a ĝis 20a de majo 2013, http://www.esperanto-nuernberg.de/e/eo/000000/main/gekextern

Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), Raleigh, Nord-Karolino, Usono, 26an de junio ĝis la 5an de julio, Bv. kontakti Ellen M. Eddy, la administranton (EDDYELLEN ĉe aol.com), aŭ vizitu http://esperanto.org/nask/

Roskilde Festivalo 2013, Roskilde, Danio, 28a de junio ĝis 8a de julio 2013, http://roskilde.festoklubo.dk/rf13

Esperanto-kastelo Greziljono, SOMERA programo, 6a de julio ĝis 17a de aŭgusto 2013, http://www.gresillon.org/somero

49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en UTENA, Litovio, la 6-an ĝis 14-an de Julio 2013, litova.ea ĉe mail.lt aŭ: http://www.esperanto.lt

4a Ateliero de FEM, Kultura Centro Esperantista en La Chaŭ-de-Fonds, Svisio, 8a-13a de julio 2013, http://www.esperantio.net

46a ILEI-KONFERENCO, Herzberg am Harz (urboparto Sieber), Germanio, 12a ĝis 18a de julio 2013, http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de

Somera Esperanto-Studado (SES 2013), Martin, Slovakio, 12a ĝis 20a de julio 2013, http://ses.ikso.net/

IEK2013, Saint-Amand-Montrond, Francio, 20a ĝis 26a de julio 2013, http://www.kava-pech.cz/iek

98a Universala Kongreso, Rejkjaviko, Islando, 20a ĝis 27a de julio, http://www.uea.org/kongresoj

86a SAT-Kongreso, Madrido, Hispanio, 28a de julio al 4a de aŭgusto http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html

Internacia Junularo Semajno 2013, Tiszafüred, Hungario, 1a ĝis 8a de aŭgusto, http://www.ijs.hu/eo

Itala Kongreso, Kastelaro (Sanremo), Italio, 03a ĝis 10a de aŭgusto, http://kongreso.esperanto.it/80/?lang=eo

FESTO, Kelmis, Amikejo, Belgio, 10a ĝis 17a de aŭgusto, http://alesk.eu/festo2013/

69a Internacia Junulara Kongreso, Nazareto, Israelo, 19a ĝis 26a de aŭgusto, http://www.tejo.org/ijk

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu